

Fajrero 5-6/1960

SOCIALISME LABORI - SOCIALISME VIVI

En la jubilea jaro 1960 Ĉeĥoslovakio fariĝis la unua lando post Sovet-Unio, kiu atingis socialismon. La deklara menifestigo de socialismo fontis ne nur de nova konstitucio, sed precipe el la ekonomiaj kaj kulturaj atingiĝoj de nia lando.

Por eviti ĝeneraligon ni iom observu la ferfabrikon "Třinecké železářny VŘSR" en Třinec, sub kies tegmento ankaŭ nia bulteno aperadas. Ĝi estas uzino kiu grave helpis establi la socialisman vivnivelon en ĉiuj hejmoj kaj komunumoj de nia lando, ne nur ĉe favoratoj, kiel tion faris la sistemo kapitalisma. Pro siaj bonaj rezultoj ĝi ricevis la "Ordenon de l' Laboro" kaj la "Ordenon de l' Respubliko". Ĝi gajnis ankaŭ honoran titolon "Eksporta entrepreno".

Per laboruloj de la uzino oni konstruas ĉiujare centojn da novaj, moderne ekipitaj loĝejoj, baldaŭ elkreskos por ili nova reprezenta kultura palaco, hotelo k. a. Ĉiuj laboruloj povas lerni en fak-kursoj kaj industrilernejoj. Ni devis lerni, ĉar novaj labormetodoj kaj vivkulturo tion postulas. Kaj ni lernas.

Aspekto de niaj fabrikoj, urboj kaj vilaĝoj ŝanĝiĝas de jaro al jaro. Ni, metalurgistoj en Třinec, estas fieraj pri nia laboro kaj lando.

TRITAGA SEMINARIO DE ESPERANTISTOJ EN ŠTIŘÍN APUD PRAHA.

De la 21-a ĝis la 23-a de oktobro 1960 aranĝis Kleriga Instituto en Praha kunlabore kun la Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato en centra lernejo de Ministerio por publika instruado kaj kulturo en Štiřín apud Praha tritagan seminarion.

La oficiala programo komenciĝis per interesa prelego de D-ro Novák el Praha, kiu analizis la mond-politikan situacion. K-do Cihlár el kabineto de la Ŝtat-Plana Komisiono prelegis pri ekonomiaj problemoj de nia ŝtato.

Sabate okazis prelego de k-do Lukeš, laboranto de la kleriga Instituto en Praha, pri problemoj de kultur-eduka laboro. La unua prelego de la prezidanto de ĈEK, de D-ro J. Jermář, temis pri organizaj kaj propagandaj problemoj de nia laboro en la grupoj. Li konstatis, ke ekzistas 140 esperantistaj grupoj en nia Respubliko.

En sia parolado li tuŝis kelkajn tre gravajn problemojn de la serioza per- kaj poresperanta laboro.

La dimanĉa programo estis dediĉita nur al problemoj ligitaj al nia laboro. La programon malfermis ideologia prelego de D-ro Jermář, kiu traktis problemojn de la internacia lingvo ĝenerale. Post tiu ĉi prelego okazis la ĉefa diskuto. El la diskuto rezultis, ke en la nuna tempo estas necese precipe altigi nivelon de la grupa laboro. Esperanto servu al la pac-afero, sed ĝi estu ankaŭ uzata por praktikaj celoj, ekz. por interŝanĝado de informoj kun specialistoj parolantaj tre malfacilajn lingvojn. Centro de la aktiveco estu do en la grupoj; Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato estas nur konsila organo de la ministerio. Estas necese eduki en ĉiu grupo kolektivon de ago-kapablaj homoj, ĉar estas esence malutila, se la grupo dependas de unu sola funkciulo. La grupo devas akiri aŭtoritaton antaŭ sia uzina komitato aŭ "Osvětová beseda". Estas rekomendinda intima kontakto inter funkciuloj ambaŭflanke.

La ĉefa ĝisnuna agado de la grupoj estas aranĝado de kursoj. Sed ili ofte fiaskas aŭ estas frekventataj nur de kelkaj homoj. Estas necese elekti kompetentan instruiston kaj kompletigi la kurson per kulturaj aranĝoj. Ĝenerale dirite estas necese intensigi la kulturen laboron de la grupoj!

Grandan malutilon al Esperanto faras malĝusta propagando. Oni nepre evitu "metodojn" de kelkaj niaj stranguloj, sed apliku ĉiam seriozan argumentadon. Ju pli serioza estos nia agado, des pli alte ĝi estos konsiderata de la superaj instancoj.

En la diskuto oni dediĉis sufiĉan tempon ankaŭ al someraj aranĝoj. - Ekde la nova jaro funkcios nova Ekzamena Komitato, kiu ekzamenos en antaŭe difinita loko kaj al frekventintoj donos diplomon pri scio de Esperanto aŭ kapablo instrui ĝin en kursoj.

En la diskuto estis ankaŭ tuŝita la malsukceso de la karavano al Bulgario. Same kiel pri Znojmo, ankaŭ ĉi tie validas, ke la propagando ne estis sufiĉa. Venontjare povos okazi kolektivaj interŝanĝaj vojaĝoj eksterlanden kun ĈEDOK. Neniu el la ĈEK reprezentis nian movadon ĉi-jare en Bruselo.

S-arioj Kilian kaj Hromada informis nin pri la eldonoj de lernolibro kaj vortaro. La lernolibro aperos eble ankoraŭ ĉi-jare, la vortaro venontjare. Por altigi la eldonkvanton, kiu estas tre malalta, estas necese sendi pliajn mendojn el la grupoj. La vortaro estos poŝformata, sed sufiĉe ampleksa.

En la diskuto aperis ankaŭ rimarkigo, ke krom la elementa lernolibro estas necese eldoni lernolibron por progresintoj, kiu certigus pluan lingvo-edukon de frekventintoj de bazaj kursoj.

Problemo de gazeto ne estis ankoraŭ sufiĉe esplorita. - Sed oni pripensas eldoneblon de kolektiva Esperanto-gazeto por socialista landaro. Sed la diskuto montris ankaŭ, kiel grava por sukcesa laboro estas horizontala kontakto inter la enlandaj grupoj. La vertikalan kontakton realigas "Zprávy de ĈEV", kiu aperas tro sporade.

La tuta diskuto substrekis, ke la seminario estis tre bezona kaj ke estus necese aranĝi pliajn, kun pli unueca programo. Evidentiĝis ankaŭ, ke ni ne scias ĉiam logike diskuti kaj la diskuton direktigi al fina konkludo.

La medio de ĉirkaŭ 60 seminarianoj estis tre agrabla - bela kaj komforta kastelo de Štiřín kun granda parko kaj fiŝlago. La programo okazis en bela salono. Eskoridoraj kaj ĉambraj debatoj ne estis escepto, dum jaroj ja amasiĝis multe da problemoj.

V. Novobilský

Hilda Dresen
MI NENION SCIAS

Mi nenion scias,
eble fantazias,
fantazias nur,

mem min primensogas,
songviziojn vokas

dum rev-songâ lul'.

Eble ĉio vanas,
sed en koro flamas
ia stranga brul' ...

Mi nenion scias,
nur anim' ebrias,
larmas la okul'.

Olda Kníchal:
ĈE L' VESPERIĜO

La sunsubiro. Lavango
de l' pura sango
okcidente.

Tagero la lasta,
infano sennaska
en lulil'.

21.4.1957

ESTIS LA AMO NUR VORTO

Estis la amo nur vorto,
vorto neniondira,
igis senchava ĝin sorto
al la anim' sopira.

Estis la am' nur fabelo
dum infanec' legita,
igis realo kaj vero,
ĝin via ven' subita.

Via alveno forskuis
la letargion vintran,
kvazaŭ printempo influis
koron ĝis nun dormintan

KOLERETO

Inter vi kaj mi
malbenita beril' ...
Ĝi taŭgas apenaŭ por
sobra ĉirkaŭpren'.

Hi, senbezona katenil',
ne faru obstaklo
en tikla tent!
Amvipo kaj ties zumo
ne konas ĉevalaĉojn.

Eugeniusz Matkowski:
FORTA DECIDO

Brand' estas hom-plago, brand' estas veneno,
Drinkulo estigas en mi abomenon,
Mi ĉiun drinkulon mortigus per pafo,
Anstataŭ brandon - mi trinkas kafon!

Ke nobla decido estiĝu la takto,
Li tuj ekkuiris la kafon kun lakto,
Kaj prete por ĝua, utila trink-frando,
Li kafon sukderis kaj trinkis ... brandon!

G. P.: EL REMEMOROJ DE PROFESORO KLIČKA.

La elstara ĉeĥa reformatoro de la harpludo, profesoro Václav Klička, skribis en siaj rememoroj pri sia restado en Hollando dum la unua mondmilito jenon:

"Kiel ŝiprompulojn, kiuj nur mirakle atingis Hollandon, savis nin tie ĉe la unua paŝo - Esperanto. Tiam mi kompreneble ne sciis la hollandan lingvon (eĉ la francan kaj anglan mi ekposedis ĝisfunde kiel aŭtodidakto nur pli malfrue) kaj germane mi ne volis paroli. Sed Esperanto estas ne nur sprite kaj spiritalte konstruita help-lingvo, sed ankaŭ *i d e o*, la elementa forto, kiu homojn reciproke pro gento kaj lingvo fremdajn kunligas kaj kunfratigas. Tion ni plej bone spertis en Hollando. La esperantistoj, kiujn mi elserĉis, akceptis nin ambaŭ kun apertaj brakoj kaj kvankam naskodevene germanoj, ili prezentis al ni gastamecon verfakte slavan. Certe mia enkonduko estis plifaciligita per tio, ke mia nomo havis jam tiutempe sian reputacion el najbaraj landoj, el Germanio kaj Anglio, sed tamen Esperanto helpis al mi komenci rektajn amikajn rilatojn kun homoj tute nekonataj. Tiuj ankaŭ aranĝis mian unuan koncerton en Hago, kiu estis granda propagando ne nur por la ĉeĥa muziko, sed ankaŭ por Esperanto. Poste la afero marŝis jam "aŭtomate" dum la tutaj kvin jaroj. La tutan landon mi traveturadis, senĉese invitate en ĉiujn urbojn grandajn kaj malgrandajn, centojn kaj centojn da koncertoj mi aranĝis, sed tio, kion mi timetis, ne okazis - mi ne ordinarigis, kontraŭe, mi konvinkiĝadis ju pli longe des pli multe, ke la hollandanoj min ŝatas. Ili donis al mi epiteton "ornans": "reĝo de harpo", kiu poste ĝeneraliĝis en Hollando kaj aliaj landoj, kaj kiu furiozigas miajn "amikojn" en la patrujo. Ankaŭ ili aprezis miajn komponaĵojn. Ekz. mia fortepiana trio estis sukcesplene prezentata en Blaricum, Hago kaj Amsterdamo. Ili neniam min trompis; kaj ĉe mia lasta koncerto adiaŭis min la hollanda publiko tiom kore ke la hollanda preso akompanis min per vortoj de tia amo kaj tiom senlima aprezo, ke pri io tia oni eĉ ne songas ĉe ni hejme. Se mi devus rakonti, kion mi tie travivis kaj per kia amo la

tieaj homoj superŝutis min, estus el tio "Mil kaj unu noktoj". Ne nur pri centoj kaj centoj da koncertoj, sed ankaŭ centojn kaj centojn da historietoj, gajaj kaj malgajaj, mi devus rakonti.

Kaj el ĉiuj brilus tiu mirinde bona, bonkora karaktero de hollandanoj. Unuavide ili ŝajnas sindetenemaj, preskaŭ fermitaj, sed kiam ili koniĝas kun iu pli proksime, ili malfermas al li la koron kaj domon. Kaj dum tiuj kvin jaroj ili bone ekkonis min kaj ankaŭ mi ilin; kaj pro tio ni nin tiom amis. Kaj mi ne hezitas diri, ke tiom da bonaj kaj tiom da sincere entuziasmaj homoj mi trovis nenie. La lando, kiu fariĝis la lasta rifuĝejo de nia instruisto de la popoloj, la lando, en kies sino ekripozis la kreinto de nia himno, la lando de buntaj, odoraj kampoj hiacintaj kaj de grizaj, fabele ravaj ventmueliloj, tiu lando de o r a j k o r o j fariĝis preskaŭ mia dua patrujo."

ESPERANTO HELPIS

Oni skribis la jaron 1942. Kaŭze de profesiaj aferoj mi vizitis en Brno la direktoron de Komerca lernejo JIB. En la interparolejo la nomita ĝuste kontaktis kun siaj docentoj, sed baldaŭ ni ambaŭ ekdebatis, en la ĉeĥa lingvo. Pro nesufiĉa klareco de termino ni daŭrigis germanlingve, sed ankaŭ ĝi ne kontentigis ambaŭflanke. Finfine la Esperanta fakesprimo solvis nian dileman embarason. Kun rido ni ĝoje daŭrigis la interparolon Esperant-lingve.

Jen la nerefuteblaj avantaĝoj ĉe nesamlingvanoj uzantaj la Internacian Lingvon: kompleta forfalo de nacilingvaj antaŭjuĝoj kaj absoluta ekvilibro laŭlingva - kiu kontestas la gigantan profiton de tiu, kies gepatra lingvo estas uzata kiel interkomprenilo?

Duan lingvon oni nur malofte ellernas tiel perfekte kiel gepatran - Esperanton ĉiuj lernis samgrade. Nur profesiaj pagataj interpretistoj ĝis nun transpontis (kontentige?) la abismon.

E. Koblischke, Wittenberg, DDR

NIA SPEGULO

ĈU SERIOZA HOMO POVAS REGULE MALŜPARI TEMPON? ĈU SERIOZA ESPERANTISTO POVAS REGULE MALŜPARI HOMOJN EN KLUBAJ KUNVENOJ? DRONANTE EN SENUTILA KAJ ENUIGA KLAĈADO? Ordigu la klubajn kunvenojn! En alia kazo MI kaj MILOJ da ceteraj devos vin ADIAŬI!

ERINACO

Belarta konkurso 1960 en BRUSELO. En la sekcio de originala poezio debutis du ĉeĥoslovakoj. La 1-an premion ricevis s-ro Jiří Kořínek el Brno por la poemo "Romanco F-majora de Beethoven", la duan premion gajnis D-ro Ludoviko Izák por la poemo "Al Altaj Tatroj". Nian gratulon!

JARKONFERENCO DE ZK ROH ĉe TŽ VŘSR n. p. TŘINEC.

Sabate la 29-an de novembro efektiviĝis la jarkonferenco de ZK ROH de Třinecké železářny. K-do Jurczok en sia raporto pritaksis tutjaran agadon de ĉiuj interes-rondetoj de la Uzina Klubo. Iujn rondetojn li kritikis, ĉar ilia agado portas al la socio

nur etajn fruktojn. Li diris, ke nur nemultaj rondetoj ekkomprenis la taskon - laŭ la decido de CK de KSČ- agi por kultura revolucio kaj socialisma edukado de civitanaro en nia lando. Inter tiuj rondetoj, kiuj ĝuste evoluigas la porsocian agadon li nomis ankaŭ nian Esperanto-rondeton kaj montris ĝian laboron kiel modelan. La agnosko de nia porsocia laboro flanke de ZK-estraro devigas nin al ankoraŭ pli intensa agado.

NI REMEMORIGIS SOLENE la 101-an DATREVENON de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. En "Třinecké železářny", la 12-an de decembro ni honorigis la eventon per recitoj kaj prelego pri la vivo kaj memdediĉo por la nobla celo - kreo de Internacia Lingvo Esperanto.

SOLENA AKADEMIO EN MARTIN. Sabate la 10-an de decembro organizis E-rondeto ĉe la Kleriga Domo en Martin solenan akademion okaze de la 101-a naskiĝdat-reveno do la kreinto de Esperanto. Al riĉa programo kontribuis ankaŭ la rondetoj el Prievidza kaj Poprad. La solenaĵon partoprenis pli ol 50 Esperantistoj el Slovakio, kelkaj gastoj venis el Moravio.

Dimanĉe la 11-an de decembro efektivigis laborkunveno, dum kiu estis taksata nivelo de la solenaĵo kaj reprezentantoj de Esperanto-rondetoj interŝanĝis opiniojn kaj spertojn atingitajn en la agado.

"FUNDAMENTO DE ESPERANTO", parte adaptita, aperos en Bratislava, antaŭmendojn akceptas: Esperantský krúžok pri Mestskom osvetovom dome v Bratislave, Suché Mýto 17.

NOVA KONSTITUCIO DE ĈSSR aperos Esperante en traduko de J. Havaš el Bratislava. La broŝura eldonaĵo enhavos krome komenton kaj la landkarton.

"INFORMILO EL BRATISLAVA" estas titolo de informa bulteno de esperantistoj en okcidentslovaka regiono.

Post Martin kaj Bratislava ekde januaro 1961 ankaŭ Košice aperigos sian regionan ligilon.

JUNULARA RONDETO EN PRAHA REFONDIĜAS.

Grupiĝis jam 15 - 20 gejunuloj. Adreso de la organizanto: o. Kníchal, Praha 3, Grégrova 22.

NIA KONTAKTO KUN AFRIKO. Nia amiko kaj kunlaboranto Ing. Zdeněk Čapek el Praha ekdeĵoris en la ĉefurbo de Egipto, en Kajro.

DANKESPRIMO AL SOVETAJ GESAMIDEANOJ: "Mi estis en Sovetunio kaj mi devas danki elkore por la afabla akcepto kaj zorgemo, kiun oni dediĉis al mi. Al s-anoj Ing. Vasilcenko, Ing. Vail, Mizeruha kaj Porublev mi dankas por la sincera bonvenigo en la Kijeva stacidomo. En Leningrad mi direktas miajn dankojn al s. Rusonova, kiu aranĝis agrablan vespereton kun s. Podkaminer kaj Kolobanov, al s. Belova por la adiaŭa akompano al la staci-domo. En Moskvo mi vizitis klubon de

medicinistoj, kie tre sincere estis akceptita. Mi aŭdis paroli pri planoj, kiuj postulos multe da streĉaj fortoj, sed la elano de ĉiuj membroj estas grava premiso por ties plenuno. Mi dankas al s. Urban Modesto pro la gvidado tra Moskvo, al s. Danovski. D-ro Salnikov kaj Sergejev Ivan Vladimiroviĉ pro la varma akcepto. Ĉiujn novajn sovetajn geamikojn salutas

A. Milatová, Třinec.

EL GDR BEZKYDY. "Kiel ano de orientgermana vojaĝ-societo mi restadis du semajnojn en la montaro Beskidoj. Dum mia restado mi ekkonis samideanojn el Frenštát pod Radhoštěm kaj ĉirkaŭaĵo kaj mi devas diri, ke ĉiam de la unua momento regis harmonia interkonsento. Estis la unua fojo, kiam mi uzis Esperanton en eksterlando, kaj mi ĉiam povis sufiĉe bone interkompreniĝi. Tiamaniere mi travivis belajn horojn, kiujn mi neniam forgesos. Al ĉiuj samideanoj, kiuj plibeligis miajn feriojn per ilia afabla komplezemo, mi el la plej profunnda koro dankas kaj diras ĝis revido!"

Karl Heinz Loewens, Brotterode, Inselabergatr. 16 GDR.

EKSTERLANDAJ GASTOJ EN PŘÍBOR. Okaze de la 10-jara jubileo de Esp. rondeto ĉe okjara mezlernejo, en Příbor vizitis la rondeton 3 gastoj eksterlandaj: geedzoj Peter kaj Maria van Bentum el Haag kaj D-ro Imre Ferenczy el Hungario.

SET KAŪZIS RELEVIGŜON. La esperantista movado en Gottwaldov plivigliĝis ekde la nova lerneja jaro. Ni sukcesis akiri novan konvenan ejon por kunvenoj en la Kleriga Domo (Gottwaldov I, Potoky 25), ni mendis du informkestojn, ni fondis bibliotekon aĉetante novajn librojn, mendis ĉiujn akireblajn gazetojn kaj preparas elementan kurson. Ni agitas per informoj en kinejoj, per afiŝoj kaj persona varbado: La kurson gvidos la eminenta pedagogo, s-ano F. Bláha. Je la plivigliĝo havis grandan influon la tendara kurso en Lančov ĉijare. La tendaro donis novajn in stigojn al partoprenintoj por plua pli intensa laboro. Ni kunvenadas regule ĉiun duan lundon je 19,30 en la menciita Kulturdomo. Ch.

JARLIBRO por rememori 10-jaran ekziston de la industria lernejo maŝinfaka en Opava (1950-1960) enhavas artikolon pri studenta Esperanto-rondeto titolitan "Per la internacia lingvo al la mondopaco!" La artikolon verkis gvidanto de la rondeto Ing. Ludvík Hipsch.

ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO!

"SMENA" n-ro 257 (Bratislava 22.10.1960) -artikolo "Reĉ je o jazykoch" (Oni parolas pri lingvoj) en 3 partoj. La plej sciataj lingvoj; Klopodoj pri tutmonda lingvo, Esperanto. Bildoj: Esp. gazetoj, D-ro Zamenhof.

"PRÁCA" (Bratislava 27.11.60) -artikolo: "Stretnutia v Bratislave bez tlmočníka" (Renkontiĝoj en Bratislava sen interparolisto) de "sk" pri s-ro Kei Kurisu el Japanio kaj lia vizito inter literaturistoj kaj esperantistoj en Bratisl.

"BOHUMÍNSKÝ ŽELEZNIČÁŘ" n-ro 16 (Bohumín 25.8.60) - frontpaĝe "Argument pro zákaz zkoušek AZ - trad. el itala "Al la Paco" A. Trombala.

"CINGROVÁK" n-ro 23 (Ostrava 19.11.60) - art. "Několik slov o esperantu" de J. Novotný.

"Jiskra" gaz. VŽKG (Ostrava 14.12.60) informas pri Esp. kurso inter metilernantoj de la uzino.

"NOVÁ SVOBODA" (Ostrava 18.12.60) artikolo pri la ekspozicio en Kojetín "Desegnaĵoj de japanaj infanoj", aranĝita helpe de Esperanto.

RUDOLF HROMADA-70 jara. S-ano Hromada, nask. 9.11.1890, dum pli ol 50 jaroj aktivas en Esperanto movado ĉeĥoslovaka kaj internacia: ĝenerala sekretario de EAĈSR, komitatano kaj honora membro de UEA, membro de la Akademio de Esperanto, aktivulo en internaciaj konferencoj en Parizo, Londono kaj Praha. Plej bona vortaristo kaj fakulo, pri Esperanto-gramatiko ĉe ni, konata tradukanto de ĉeĥa poezio...

Malgraŭ kvin jaroj trasuferitaj en nazia koncentrejo li fartas en bona sano, kiun ni sincere deziras al li por pluaj jaroj de lia kreoriĉa vivo!

NOVAJ INTERESULOJ PRI " FAJRERO " ALIĜU ĈE VL. KOČVANA, OSTRAVA VIII, KAMENEC 3

LA MOVADO EKSTERLANDE

La 46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazas la 5-12.8.1961 en Britujo, en Harrogate.

U.K. en j. 1965 AL JAPANIO. LA 47-a Japana Esperantista Kongreso decidis inviton de la Universala Esperanto-Kongreso en j. 1965 al Japanio.

KONFERENCON DE LA POPOLUNIVERSITATOJ en Strasbourg 9-11.9.1960 vizitis 200 personoj el 14 landoj, inter kiuj 20 personoj el Francio, Italio, Germanio, Svedio kaj Svislando scipovis Esperanton.

UNU FONDITA ANTAŬ 15 JAROJ. Okaze de tiu datreveno ricevis la Ĝenerala Sekretariejo de UNU multe da gratuloj de diversaj organizaĵoj, kiuj samtempe esprimis sian dankemon al UNESCO, kiu rekomendas Esperanton kiel lingvon utilan en internaciaj kontaktoj kaj agnoskas ĝin kaj uzas en siaj eldonaĵoj.

NOVELEKTITA CENTRA KOMITATO DE "PEA". La 13.11.1960 okazis tutpollanda konferenco de delegitoj de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz, kie oni elektis novan estraron. Prezidanto de Ĉefa Estraro fariĝis nelaciĝema kaj ĉiam vigla s-anino Prof. Halina Szablowska el Varsovio. Konsilantoj fariĝis inter aliaj ing. Glajcar el Cieszyn kaj red. Kazimierz Malycha, ambaŭ konataj al ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

15-JARA JUBILEO DE "IKP". Okaze de la 15-jara ekzisto de "Ilustrowany Kurier Polski", organo de CK de SD, oni ordenigis la sekretarion de ĉi tiu revuo, red. Kazimierz Malycha, per Kavalira Kruco de Restarigo de Polujo. Danke al red. Malycha, "IKP" publikigas ĉiusemajne eĉ kelkfoje artikolojn pri Esperanto, per kio ĝi

meritigis pri disvastigo de Esperanto Inter pola loĝantaro.

LA 5-an INFANAN KONGRESETON en Domaine d Argenteuil apud Waterloo partoprenis 87 geknaboj el 10 landoj.

LA DANA MINISTRO POR ENLANDAJ AFEROJ, s-ro Soren Olesen, prelegis la 30.9.1960 en la dana radio pri:

Esperanto - _la solvo de la interpopola lingvo-problemo.

ESPERANTO EN LERNEJOJ. En Jugoslavio estas nun 127 lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton al preskaŭ 4.000 gelernantoj.

En Pollando dum 1960-61 oni instruas Esperanton en 50 lernejoj, ankaŭ en universitatoj de Varsovio, Poznan, Vroclavo kaj Krakovo. Estas preta lernolibro por la elementaj lernejoj, nun estas verkataj lernolibroj por mezlernejoj kaj instruistaj institutoj. La komitato por enkondukado de Esperanto en lernejojn organizas kursojn por instruistoj en la tuta Pollando.

JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO naskiĝas. La komitata prezidanto-sekretario: Michel Turin, 43, rue Emile-Magnin, Pontarlier (Doubs), Francio.

SVEDA ESPERANTISTA JUNULARA UNUIĜO honore premias la plej aktivan junularan grupon de agadjaro per martelo ĉirkaŭvolvita per verda rubando, sur kiu estis broditaj nomoj de la plej bonaj grupoj. Ĉi-jare la premion gajnis LA VERDA RINGO el Ystad.

SOMERA ESPERANTO-TENDARO de Beogradaj gejunuloj, nomata "MOSKITO", situis nunjare sur tute neloĝata riverinsulo proksime al Beograd.

ESPERANTO-TENDARON somere 1961 okazigos bulgaraj esperantistoj apud Monto-domo ESPERANTO en la montaro Vitosa. La organizantoj klopodas modele prepari la tendaron, atingi kaj superi la reputacion kaj kvaliton de niaj SET-oj. Ni amike deziras al ili plensukceson. En la reciproka konkuro ni klopodos teni la unuan lokon.

MONTO-DOMO "ESPERANTO" kreskas apud la ĉefurbo de Bulgario, sur Vitosa. Ĉiudimanĉe 20-30 esperantistoj helpas dungitaj masonistoj, por ke la domo estu baldaŭ preta. La laboron partoprenis ankaŭ geesperantistoj el Sovet-Unio, Pollando, Hungario kaj Svedio. Multaj donacis pli ol sian unutagan salajron por finkonstruo kaj mebligo de la montodomo. Italoj kaj Svedoj ankaŭ kontribuis. En la printempo 1961 la montodomo ekfunkcios. Tiam je dispono al esperantistaro estos la tuta domo, granda 145 kv. metrojn, situanta en pitoreska pejzaĝo, 1350 m super la mara nivelo. Tie oni organizos feriojn, seminariojn, kursojn, prelegojn k.a. Funkcios ankaŭ biblioteko kaj konstanta ekspozicio. Oni jam kolektas librojn kaj esperantaĵojn. Se vi povas, sendu tiajn je adreso: Monto-domo, p.k. 44, Sofia, Bulgario.

"KOMUNUMA KURSO DE ESPERANTO". Ĝi estas oficiala Esperanto-lernejo de la urbo Sao Paulo en Brazilo. La lago pri ĝi estis publikigita 4.8.1960 en la oficiala organo de la komunumo.

PROPONO PRI "TAUTE" . Tutmonda Asocio de Urbaj Trafikistoj-Esperantistoj estas diskutata en Esperanto-grupo "ZET" (R.Konĉara ul. 239, Zagreb V, Jugoslavio) kaj en trafikista gazeto "Vjestnik ZET" , kiu havas lastapaĝe regulan rubrikon en Esperanto.

INTERNAGIA SPECIMENFOIRO DE BAECELONA eldonis sian oficialan afiŝon en Esperanto, kun plurkolora desegno en la formatoj 70x100 cm kaj 30x40 cm. Oni povas ricevi ĝin senpage. Petantoj menciui, kie la afiŝo estos montrata (vendejo, turisma oficejo, stacidomo k.s.) Turnu al adr.: Feria Oficial e Internacional de Muestras, Wegociado de Propaganda, Paseo de Maria Cristina, BARCELONA - 4, Hispanio.

LABORTENDARO POR ALĜERIAJ RIFUĜINTOJ. Pro la milito en Alĝerio miloj da Alĝerianoj rifuĝis el sia lando al Maroko kaj Tunizio, kie de ili estas nun ĉirkaŭ 250.000. En la malriĉaj gastig-landoj ili vivas en mizeraj cirkonstancoj en kavoj kaj kabanoj el arbobranĉoj, kiuj ŝirmas sufiĉe nek kontraŭ pluvo nek kontraŭ malvarmo.

Nedederlanda branĉo de la Internacia Civila Servo I.V.H. organizos en Amsterdam la 2-7.1.1961 kolektadon de vestaĵoj por la rifuĝintoj. Kiel eksperimento unu el lirngvoj en labortendaro estos Esperanto.

"TRAGEDIO EN UNIVERSO" - mirinda verko de 25 junaj jugoslavaj astronomoj el Zagreb.

... antaŭ la okuloj de la alvenintoj el la kosmo de la planedo "Racio" , elstaras la terura vizio de pereado de la mondo en hidrogenmilita kataklismo: pereas milionpopolaj urboj en fajrego de hidrogenmilita ĥaoso. Sed ne pereas nur la homaj vivoj, pereas ankaŭ verkoj de Platon, Mikelanĝelo, Tolstoj, Beethoven, Einstein – pereas la tuta kulturo kaj civilizaciuo, kiujn la homaro kreadis dum jarcentoj.

La libro "Tragedio de Universo" vekis neimageblan atenton de la tuta jugoslava publiko. Triobla eldonkvanto kaj tamen jam post unu monato prepariĝas nova eldono. Pri traduko interesiĝas jam pluraj landoj, la Esperanta traduko estas jam preta. Laŭ la libro estos farita scenaro por filmo "Ni volos vivi!".

En la astronomia vizio de la aŭtoroj science kaj filozofie elmontriĝas la tuta sensenco de la nuna stato sur la tero kiel planedo en kosmo: homaro dividita je 100 ŝtatoj kaj popoloj, 3000 lingvoj, militoj kiel en sovaĝaj praepokoj ktp. La aŭtoroj ekverkinte sian libron ne estis esperantistoj, sed la temo alkondukis ilin al Esperanto. Ĉiuj ellernis Esperanton kaj proklamis ĝin kiel ununuran logikan solvon de la mondlingva problemo. La observatorio en Zagreb fariĝis vere "verdstela observatorio".
Laŭ Esperanto"-10.

SOVETA POETO AL JUNAJ ESPERANTISTOJ. "Miĉurinskaja pravda" n-ro 37 el la 23.2.1960 informas, ke fama soveta poeto Miĉail Isakovskij skribis al gestudentoj de frukto-kultura instituto je nomo de Miĉurin Estas vero, ke en junaĝo mi sciis la lingvon Esperanto. Estas ankaŭ vero, ke mi provis en tiu lingvo verki poemojn, sed mi verkis nur unu aŭ du - ne pli. Mi memoras ankoraŭ, ke mi tradukis el Esperanto en la rusan lingvon la poemon "La naŭa valo" (aŭtoro Schrind). Ĝi estis publikigita en provinca gazeto somere 1917. Mi memoras plu, ke ke mi provis traduki (kaj se mi ne eraras, mi tradukis komplete) en Esperanton la rusan popolan kanton "ne la vento branĉeton fleksas". Mi faris ĝin laŭ peto de unu itala komponisto..... Lernu Esperanton kaj okupu vin per ĝi en plena vasteco. Kiel helpa lingvo Esperanto estas tre bona liringvo kaj ĝia utilo estas sendube tre granda..." (Tradukinto ne respondas pri korekteco de la nomoj de poemo, kaj ties aŭtoro). In

PROF. D-RO GIORGIO CANUTO, prezidanto de UEA, forpasis la 29-an do oktobro en Torino. La Esperanto-movadon, en kes frunto staras neŭtrala UEA, trafis tiel subita kaj kruela bato ĝuste en periodo de organiza leviĝo. Profesoro Canuto, estro de la katedro en Universitato de Torino kaj direktoro de la Instituto de Jura Medicino, eksrektoro de la Universitato en Parma, portanto de la alta ordeno de Granda Oficiro de la Itala Respubliko, meritas elstaran lokon en vico de batalantoj pri la internacia kompreniĝo kaj nian primemoron.

NI DISKUTAS PRI INFORMADO

KION EN LA ELMONTRAN FENESTRON?

Tiu ĉi demando estas ofte problemo en tiuj Esperanto-rondetoj, kiuj zorgas pri ia elmontra kesto en sia urbo. Kaj tiu ĉi demando onin frapas, kiam oni iradas du aŭ tri monatojn preter la kesteto, kies enhavo, ĉiam la sama, - jam griziĝis, paliĝis kaj kovris sin per polvo.

Oni nomas la kestojn propagandaj. Kaj kion oni plej ofte vidas en ili? Leterojn el eksterlando kun allogaj poŝtmarkoj kaj bildkartoj kun pli aŭ malpli trafa instigo, ke oni lernu Esperanton, la plej facilan lingvon en la mondo. El tio videblas laŭŝajne, ke Esperanto estas nur poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj kaj ke esperantistoj estas divers-specaj kolektantoj.

Ni ĉesu nomi niajn kestojn propagandaj. Ni transprenu ilin je kestoj informaj. Ni ne propagandu per ili Esperanton, sed informu pri ĝi. Esperanto jam havas tian pozicion en la internacia vivo, ke nura informado jam estas propagando plej efika. Sed nia informado estu sistema. Ekzemple nia rondeto ellaboris planon de tia informado. Ĝi estas vico de temoj, pri kiuj ni informas la publikon. Oni povas eĉ precizan tempon fiksi al ĉiu temo. Tia plano havas ankaŭ tiun utilon, ke oni povas kolekti materialon monatojn antaŭe. En la kesto ne povas manki ankoraŭ konciza indiko de tago, horo kaj loko de grupaj kunvenoj kaj adreso de persono, kiu en la koncerna loko povas doni informojn pri Esperanto.

Jen kelkaj ekzemploj de konvenaj temoj:

Esperanto en turismo (Jarlibro de UEA, prospektoj), E. en literaturo (libroj aŭ ties kovriloj, listo de tradukoj el la monda kaj nia literaturoj, literaturaj gazetoj), E. en filatelio, E. en teatro (teatraj ludoj en E., pri Verda Ĉaro, programoj), E. en radio

(listo de stacioj elsendataj en E., prospetoj de tiuj stacioj, Verda Stacio), E. en pacmovado ("Paco", informoj pri agado), E. en internacia amikiĝo (fotografajoj de eksterlandaj korespondantoj kun interesaĵoj el iliaj leteroj), povas sekvi: Esperanto en geografio, gazetaro, filmo, kongresoj, lingvistiko, muziko, scienco ktp.

Se oni regule ŝanĝos la enhavon de la kesto, la publiko kutimiĝos al ĝi kaj vi akiros regulajn sekvantojn de viaj informoj. Vi vekos intereson kaj tio estas la plej grava tasko de inform-kesto.

J. C.

LINGVA ANGULETO

BULTENO de EK Praha, n-ro 56 (aŭtoro-Pu) atentigas, ke frazo: "sendi leteron registrite" estas neĝusta en la senco "poslat dopis doporučeně". La ĝusta formo:

SENDI LETERON REGISTRITA

Simile: anstataŭ "neatendite mi ricevis gastojn" aŭ "almetite mi sendas fotografajon", uzu:

SENATENDE MI RICEVIS GASTOJN

ALMETE MI SENDAS FOTOGRAFAĴON

KIEL INSTRUI AKUZATIVON?

Ni prezentas proponon de D-ro Josef Černý pri ekspliko de akuzativo en Esperanto-kursoj:

Mi rekomendas, precipe en la elementaj kursoj, priparoli la aferon jene:

Temas pri uzo de finaĵo -n. Ĝia rolo estas

1. akuzativa, kie ĝi esprimas objekton. Ekz.: mi vidas vin, mi vidas homon, donon, straton k. s.
2. esprimas direkton: mi iras en banlokon K. Vary, morgaŭ ni veturos Parizon,
3. esprimas tempon: la kurso daŭros tri monatojn,
4. esprimas distancon: la vojo estas longa dek kilometrojn,
5. esprimas dimension: la agro mezuras kvin hektarojn,
6. esprimas pezon: mia onklino pezas 80 kilogramojn,
7. esprimas alton: nia domo estas alta 15 metrojn,
3. esprimas prezon: la robo kostas 200 kronojn.

Tia klarigo pri rolo de la -n-litero, resp. finaĵo, estas pli praktifa, ĉar ne ĉiuj homoj komprenas, kio estas AKUZATIVA UZO, resp. FORMO, resp. MORFEMO. (Red.: Komparu kun "Lingva anguleto" en "Tagiĝo" n-ro 40 - julio 1958).

B/ KURSO J. Cink

Vi ne povas ellerni fluan parolon en la kurso, ĉar ĝi daŭras ne tro longe kaj ne estas tiom ofte, kiom estas bezone por ellerni flue paroli. Vi mem devas eluzi ĉiun okazon por ekzerci vin: ekster kurso dum grupa kunveno, kun geamikoj kaj ankaŭ se vi estas sola kaj neniu vin povas aŭskulti, parolu al vi mem laŭte!

Ekz. 59-a: BONE MEMORU: Po základní číslovce, která není zakončena na "o", dáváme podstatné jméno bez jakékoli předložky a skloňujeme ho bez ohledu na číslovku, která předchází. Číslovka se nemění, jen rozšiřuje význam podstatného, jména.

Ekz. 60-a: Traduku: Estis tie kvar homoj. Ĉu vi havas legitimilojn de tiuj du anoj? Mi skribis al miaj du amikoj. Donu al mi tri pecojn! Mi perlaboras mil ducent kronojn. Tio estas por dek homoj.

Ekz. 61-a: Ellernu flue traduki: Bylo tam jen 5 lidí. Už mám jen 10 Kčs. Kroužek má 25 členů. Před námi jdou 2 lidé. Napočítal jsem 123 schodů. Město má 300.000 obyvatel. Do sálu se vejde 200 lidí. Jedeme na 3 dny na výlet. Dal jsem za to 54 Kčs. Za dva dny jedeme domů.

Ekz. 62-a: Traduku: kolektita, kolektata, metita, metata, frapata, malfermita, konata, purigita, vidita, vidata, pagata, disvastigita.

Ekz. 63-a: Faru formojn kun "-ata" kaj "-ita" kaj traduku ilin en la ĉeĥan ĉe jenaj verboj : sendi, mendi, fini, skribi, lavi, fari, paroli, vendi.

Ekz. 64-a: Formu frazojn al vortoj el la ekz. 62-a !

Ekz. 65-a: Skribu la tradukon de frazoj el la ekz. 61-a! Ĉiun numeralon skribu vorte!

Ekz. 66-a: Traduku: Hrst drobných (peněz). Koš brambor. Málo sněhu. Metr látky. Dvě kila mouky. Kousek chleba. Moc bláta. Dejte mi prosím 20 dkg bonbonů! Vypil jsem 2 sklenice piva. Kup tam také láhev sirupu! Máš dost peněz? Máme ještě dost času. Tady je moc vody.

Ekz. 67-a: Ellernu nekonatajn vortojn el la jenaj: Mungi, terni, oscedi, ronki, tusi, singulti, brako, kruro, ventro, dorso, fingro, genuo, kubuto, ungo, ŝultro, kalkano, manplato, mandorso, plando, polekso, mentono, brovo, stomako, pulmo, spiri, cerbo, cerbumi, sangi, intestoj, salivo, muskolo, resanigi, doloro, vundo, kuracisto, medikamento, malsanulejo, hospitalo, bandaĝo, nazkataro, ripo, kapdoloro, inflamo, ulcero, malvarmumo, angino.

Ekz. 63-a: Respondu demandojn kaj formu pluajn similajn: Kion vi faras per brakoj? Kruroj? Kie estas dorso? Kiom da fingroj ni havas? Montru kubuton! Kiel fleksiĝas kruro en genuo? Per kio finiĝas fingroj? Kiel nomiĝas fingroj? Kion oni portas sur ŝultroj? Kiel nomiĝas posta parto de plando? Kiujn flankojn havas mano? Kion ni havas en kapo? Kiujn organojn ni havas en ventro? En buŝo? En brusto? Kiujn malsanojn vi jam havis? Kien vi iras, se vi estas malsana? Kion faras kuracistoj? Se via malsano estas grava? Kion oni faras kun vundoj? Pro kio ekestas kapdoloro? Kiu estas la plej malgrava malsano? Ĉu vi havis jam gripon? Anginon? Kiu malsano ekestas pro malvarmumo? Ĉu ulceroj doloras? Kion oni faras ofte dum nazkataro? Kion ankoraŭ? Kion faras homo, se liaj pulmoj malsaniĝas? Kion vi faras, se vi estas dormema? Se vi tre ploras?

Ekz. 69-a: Tralegu kaj sen traduko kaptu la sencon: KALKULITAJ STELOJ. Venis oficiro al sia soldato, kiu ĝuste staris gardante. La oficiro demandis lin montrante la firmamenton: "Kiom da steloj estas tie?" La soldato respondis: 5 234 699!" Ekmiris la oficiro pro la tuja respondo kaj demandis: "Kiel vi tiom precize scias tion?" La soldato respondis: "Se vi ne kredas, sinjoro oficiro, vi povas rekalkuli ilin!"

(Kabe, Unua legolibro)

Ekz. 70-a: Traduku la rakonton kaj poste mem rakontu ĝin Esperante.

Ekz. 71-a: Traduku kaj ekspliku jenajn vortojn: meti, doni, luno, monato, sonĝi, revii, vundo, doloro, aŭskulti, obei.

Ekz. 72-a: Formu frazon al ĉiu vorto en la pasinta ekzerco!

Ekz. 73-a: Provu ankaŭ: Faru el la literoj de la vorto ESPERANTO pluajn vortojn:

Ekz.: espero, paro, rano, ero, sato, pano, taso, per, pro, por.... ktp.

Simile faru novajn vortojn el ekz.: KARUZELO, PARDONO, AEROPLANO, MALSANULEJO ktp.

Ekz. 74-a: Traduku (hejma tasko): Přinesl jsi něco? Víš o tom něco? Něco si zatím přečti! Něco se stalo. Šel pro něco domů. Něco z toho znám. Všechno jsem už rozdál. Řekni mi vše co víš! Nemůžeš všechno vidět. Ve všem něco vidíš. Všechno má konec. Všechno je v pořádku.

Ekz. 75-a: Libere traduku la kanton Tagiĝo. (Hejm. t.)

Ekz. 76-a: Rakontu pri la kunveno de via Esperanta rondeto. (Hejma tasko)

Ekz. 77-a: Skribu konversacion, kiu okazas en vendejo dum via granda aĉetado. (Hejma tasko).

RECENZOJ

"VIVU LENINISMO" -eldonaĵo de Ĉina Esperanto-Ligo por memori la 90-an datrevenon de la naskiĝ-tago de V. I. Lenin. La broŝuro 102-paĝa enhavas tri socisciencajn kontribuojn de la gazeto "Hongki", de la ĵurnalo "Jenmin Jibaŭ" kaj de k-do LU Dingji. La libro konigas al ni bazojn de leninismo. Ĝian aĉeton ni rekomendas kaj al la unuopuloj kaj al ĉiuj Esperanto-grupoj. Postulu ĝin en la vendejo KNIHA (Praha 2, Václavské nám. 42).

"AKUZILO KONTRAŬ LA KRIMO DE USONO - DZIEM RILATE AL SUDVJETNAMAJ INTELEKTULOJ"-eldonita de la Komitato kontraŭ la persekuto de sudvjetnamaj intelektuloj fare de USONO-DZIEM. Tiu ĉi 20-paĝa kajero ne meritas nuran recenzon, sed vastan publikigon kaj kondamnon de tiuj, kiuj pekas kontraŭ homo kaj aliaj rajtoj, kontraŭ vivo kaj sano de centmiloj, kontraŭ sampatrujanoj en Sudvjetnamio. Sed prefere sekvu kelkajn citaĵojn por povi imagi sencon de la "Akuzilo":

"... la ordono pri militĉesigo estas devige aplikata en Mezvjetnamio ekde la 1.3.1954; nur 24 horojn poste, ĉe Kim-doi en provinco Quang-tri, la arme-fortoj de Ngo dinh Dziem pafis kontraŭ la amaspopoloj starigantaj mitingon por bonvenigi la restarigon de paco kaj okazigis 30 morto- kaj vundo-kazojn.... "

"... La gangsteraj lakeoj de Ngo dinh Nhu, frato kaj politika konsilanto de Ngo dinh Dziem, perfortis dek aliajn teatrogrupojn kaj ĵetis grenadojn sur la scenon.... oni nombris entute 27 homojn mortigitajn... "

"Ĉe la fino de 1958... la registaro de Ngo dinh Dziem laŭ sugestoj de siaj usonaj konsilantoj faris teruran krimon amasmortigante per venenigo 6000 patriotojn en la koncentrejo Phu-loi, el tiuj pli ol 1000 mortfalis kaj multaliaj grave malsaniĝis."

".... la dekreton n-ro 13 sudvjetnamaj ĵurnalistoj nomis "spado ĉe la kolo de ĵurnalista".... post ĝia aperigo estis 40 redakcioj disigitaj kaj pli ol 30 redaktoroj

malliberigitaj. "

"... la kliko Dziem devigis la tielnomatajn "deputitojn" de la pseŭdo "parlamento" antaŭe fari sian propravolan rezigno-petskribon sen datigo.... "

"... Sudvjetnamio havas 328 koncentrejojn laŭ modelo de hitleraj koncentrejoj, el tiuj 8 plej grandaj povas sin kompari kun tiuj de Aŭsvitz, Dakao, Buhenvald ktp...

"Ĝis aprilo 1960, 230.000 homoj estis arestitaj, 10.625 homoj estis vundpafitaj en dezertigaj operacioj, 14.300 mortigitaj kaj perdiĝintaj... "

"La graveco de la nuna situacio postulas, ke ĉiuj bonvolaj homoj akurate agu, ke vi laŭtigu vian voĉon, ke vi per ĉiuj rimedoj partoprenu en la batalo kontraŭ la persekuto de la sudvjetnama intelektularo kaj popolo..

ATENTU!

LEGANTOJ DE APUD JIHLAVA KAJ HAVLÍČKŮV BROD, HELPU AL NI!

La 9-an de majo 1945 pereis en via regiono 18-jara leŭtenanto, tankisto Boris Gindin, filo de D-ro Lazaro Gindin, kiu loĝas en Moskvo - 48, str. Kliničeskaja 2, log. 8.- Proksimuma loĝindiko: proks. 10 km de Jihlava direkte al Havlíčkův Brod. Liaj gepatroj petas nin pri sciigo, ĉu ekzistas lia tombo aŭ komuna tombo, kie li estis tombigita. La sciigon sendu al la indikita adreso aŭ al la redakcio de Fajrero!

ESPERANTISTA MASKOBALO EN BRNO (SLOVAN) okazos la 4-an de februaro 1961.
--

ANONCETOJ

SAMIDEANOJ, kiuj ĉeestis la seminarion en la kastelo Štiřín 21 - 23.10.60 povas sendi sukcesajn grupfotojn ĉe: Jindra Polán, Větrný Jeníkov 57, okr. Jihlava.

ESPERANTO-KURSON de A. Cseh, eld. de I. E. Instituto en Haag, 1957 j., mi interŝanĝos je Granda vortaro ĉeĥa-esp. de Filip. Valentín Kibaĉiĉ, Tichý Potok, p. Březovice n/T.

KUN ĈS. GES.-ANOJ dez. kor. pri laboro kaj vivo s-ano A. Smildziuš, str. Daliju 14-1, Riga 2, USSR.

KUN NUDISTOJ, NATURISTOJ, pri organizado de grupoj en UEA kaj INF dez. kor.: S-ro Leif Heilberg (28-jara), 447 Cole Street, San Francisco 17, California, USA.

PRI LITERATURO, ARTO, FILMO, SPORTO, dez. kor. 24-jara univ. studento: Yang Chung Kuen, No. 161 Chen Chien Ji str. WUHAN (Hankow), Ĉinio.

MINISTOJ! Individue kaj grupe dez. kor.: Minista Esperanto-Rondo, "Attila Jozsef", Kultura domo, DOROG, Hungario.

ALUMET-ETIKETOJN kolektas, interŝanĝas: S-ro József Benkö, Budapeŝt XIII, Reitter Ferenc u. 39, Hungarlando.

MEDICINISTOJ! Membroj de la Klubo de esp-istoj laborantoj en medicino en Moskvo dez. interŝanĝi informojn kaj spertojn pri-medicinajn kun niaj kuracistoj, farmaceutistoj, flegist(in)oj: Centralnyj dom kultury medicinkich robotnikov, Esperanto-rondeto, ul. Gercena 19, Moskva, USSR.

POLA E-GRUPO dez. kor. (kuracisto, librotenistoj, frizistino, horloĝisto, instr. k.a.) kun iu grupo en Ostrava-regiono, interŝ. esp.-aĵojn kaj inviti preleganton. Adr.: George Podbielski, Mjenziječ Vlcp, voj: Zielona Gora, Marcinkowski 11, Pollando.

DU BULGAROJ (19-jaraj) dez. kor. pri div. temoj, interŝ. vidaĵkartojn, dancmuzikajn notojn, gramodiskojn, revuojn: Georgi Kostov (paraŝutisto), str. Vasil Zarkov n-ro 19, Vraca, Bulgario. -Peter A. Todorov, str. Sredna gora n-o 88, Sofia 3, Bulgario.

MUZIKISTOJ! Tutmonda Esp. Junulara Organizo eldonos en Bulgario tutmondan kantan notoj. Urĝe estas serĉataj kunlaborantoj en ĉiuj landoj. La materialojn oni sendu al: Nik Nikolov, p. k. 44, Sofia, Bulgario.

ESP. FERVOJISTA GRUPO (40 jun. 10 plenkrej.) dez. kor. kun gelernantoj el ĉiuj landoj pri ĉiu temo. Ni nepre respondos dum marto 1961. Adr.: Esp. Grupo S.N.C.F., 1 rue de Paris, St. Etienne du Rouvray, Seine Maritime, Francio.

PER BILDKARTOJ kun eksterlandaj gejunuloj, dez. kor.: F-ino O1ga Šmidová, Nerudova 545, Kyjov, ĈSSR.

PRI KONSTRUKCIOJ KAJ KONSTRUMETODOJ DE INDUSTRIAJ OBJEKTOJ dez. kor.: Ing. Jan Werner, Ostrava III. U vodojemu 5, Ĉeĥoslovakio.

LA RESPONDA REDAKTORO :

Per tiu ĉi numero mi finas mian funkcion de ĉefredaktoro de nia regiona ligilo Fajrero. Mi dankas al ĉiuj miaj kunlaborantoj, sed ne adiaŭas, ĉar plu restos en proksima kontakto kun vi. Al la nova ĉefredaktoro Jaroslav Novotný el Ostrava, mi deziras favorajn kondiĉojn por tiu ĉi ĝojiga laboro kaj al la legantoj pluekziston kaj daŭran plibonigon de Fajrero!

Ing. Jan Werner

VLASTIMIL KOČVARA, admin. de Fajrero, anoncas por urĝaj korespondaĵoj adreson de sia nova restadejo: OPAVA, Gogolova 28. - La ĝisnuna adreso ankaŭ validas.

SINCERO. ŜPAREMO.

- Kial vi havas la librojn sur planko?
- Ĉar libroŝrankon al mi neniŭ pruntis!

- Mi ne ŝatas manĝi multe.
- Kial?
- Ĉar tio forigas al mi la apetiton! (LaLampiro)

FAJRERO estas bulteno de junaj esperantistoj en Ostrava-regiono. Aperas laŭbezone.

DECEMBRO 1960. N-ro 5 – 6 (11)

ELDONAS: ZK ROH Třinecké železářny VŘSR, E-kroužek

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner (responda)

ADMINISTRAS: Vl. Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 3.,
Ĉeĥoslovakio

T-03-10144